

1971
numero 3

# JEN BULTENO

kvaronjara esprimilo de la
Junularo Esperantista de Nordameriko

## ELEKTO DE ESTRARANOJ 1971: REZULTOJ

32 membroj partoprenis la ĵusan balotadon kaj elektis la jenan estraron: Scott Aleshire, Erik Felker, Thomas Goodman, Michael Larkin kaj Lila Wysinska. La nova estraro eklaboros la 1-an de septembro.

* * * * * * * * * * *

## SENHONTA DISKURSO: OPINIOJ PRI NIA AFERO

Michael Larkin

Mi dubas ĉu oni povas esti Esperantisto dum pli ol kelkaj tagoj sen cerbumi pri kiel alfronti la problemojn kiuj baras al ni la vojon. Kompreneble, mi havas miajn proprajn ideojn. Antaŭ ol solvi problemon necesas kompreni ĝin--scii ne nur kia ĝi estas sed ankaŭ kial ĝi ekzistas. Jen miaj interpretoj pri du aroj da parencaj aferoj.

I. Ĉiu viva lingvo apartenas al popolo. Kiu argumentus kontraŭe? Inter la eblaj rimedoj distingi inter popoloj, la plej ofta, plej facila, kaj ĝenerale sufiĉe fidinda, estas apartigi grupojn laŭlingve. Ke foje pli ol unu popolo posedas saman lingvon (ekzemple, la brazila kaj portugala popoloj kiuj ambaŭ parolas la portugalan) ne ŝanĝas la esencan valoron de ĉi tiu aserto.

Paroli pri nacieco, kvankam oni emas konfuzi la du nociojn "popoleco" kaj "nacieco," estas alia afero tute. Ekzemple, la poloj vivas en Pollando kaj parolas la polan lingvon. Ĉe grupoj kiaj la poloj la nocioj fakte ŝajnas esti preskaŭ sinonimaj. Sed la distingo iĝas pli klara ĉe, ekzemple, la svisoj, kiuj efektive ne estas popolo sed nacio. Ili parolas kvar lingvojn: la francan, la svis-germanan (Schwyzerdütsch), la italan, kaj la romanĉan--kaj apartenas al la popoloj de tiuj lingvoj kvankam ili apartenas al la svisa nacio.

Esperanto estas viva lingvo. Ni konsentu pri tio. Ĉu la Esperantistaro do konstituas popolon? Konsultante la Plenan Ilustritan Vortaron (PIV) mi jenon legis: "*POPOL/O 1 Vasta grupo da homoj, konsciaj pri sia malsimileco kun la ceteraj najbaraj grupoj..." Kaj samloke la jenaj vortoj de Zamenhof troviĝis: "...peco de tiu miksdevena kaj tamen lingve kaj kore unuigita popolo nun staras antaŭ vi." Pripensu la esprimon "Esperantujo."

Oni ne devas akcepti ĉion en la PIV, sed kiu hastus kontraŭdiri Zamenhof? Ĉu liaj vortoj ne pruvas ke la ĝusta respondo al la demando, "Ĉu la Esperantistaro konstituas popolon?" estu: "Jes."? Bonvolu ne plendi ke oni ĉiam povas "pruvi" la pravecon de sia argumento helpe de lerte selektitaj citaĵoj, kaj ke vortaro ne estas leĝdonilo sed nura helpilo, ĉar mi ne deziras disputi tion. Eĉ eblas ke Zamenhof uzis la vorton "popolo" nur alegorie en tiu frazo. Tamen, speciale pro la apero kaj daŭra disvolviĝo de io nomita "originala Esperanta literaturo," la afero meritas traesploron.

Apenaŭ necesas mencii ke oni ĉiutage ĉiel uzas nian lingvon, ke denaskaj Esperantistoj naskiĝas (malgraŭ asertoj ke "neniu patrino alparolas sian infanon Esperante"), ke multspecaj eldonaĵoj eldoniĝas, ktp. Antaŭ longe mi konsideras ke ni devus nomiĝi popolo. Laŭ kiu ajn interpreto, ni almenaŭ iasence plenumas la difinon de tiu vorto. Fine, estus stulte malatenti unu ŝajne ironian rezulton de Esperantismo: iuj homoj jam aniĝas al la popolo de la estonteco dum aliaj ankoraŭ ne faris tion, kaj do efektive kreiĝis nova popolo!

Esti popolo, kion tio signifas; kiel pesi la aferon? Ĉe ni, la dua parto de la difino en la PIV havas specialan gravecon: "...kaj loĝantaj kune, plejofte en unu sama lando.". Ĉu ni konstituas popolon? Multaj el ni konsideras ke efektive la mondo mem estas ilia "lando." Akceptinte la ideon, oni tamen konsciu la jenon: ĉar ni estas popolo kiu disvastiĝis tra la tutan terglobon, estas malfacile subteni kaj kunteni nin (ne menciante strebi pli efike al la Verda Venko). Zamenhof antaŭvidis tempon kiam "sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento, unu grandan rondon familian." Tio restu nia celo, sed por atingi ĝin necesas pli ol ideologio.

II. Estante popolo, ni certe havas la rajton, ja efektive la devon, konservi nin ĉi tia. Ĉi tio veras ne nur ĉar ni estas popolo, sed ankaŭ ĉar ni alportas ion treege gravan al la tuta homaro, jes!, komunan lingvon!

Ĉe aliaj popoloj lingva unueco kaj komuna kulturo estas naturaj rezultoj de kunvivado. Ĉar Esperantistoj nur malofte povas vivadi kune, ni faru ion por alie kontraŭagi la mankojn kiuj estiĝas ĝuste pro nia speciala situacio. Ke Esperanteparolantaj komunumoj estus helpaj (speciale ekonomie) oni apenaŭ povas dubi, sed je la nuna stadio de nia afero la ideo ŝajnas al mi esti bedaŭrinde iom nerealeca.

Do, kiamaniere ni agadu? Inter la fareblaj aferoj kiel, ekzemple, diversspecaj organizaĵoj, kongresoj, personaj renkontiĝoj, ktp, eldonado ludas plej elstaran rolon. Kial diri tion? Eldonado gravas, ja nepras, ĉar nur pere de tio ni povas certigi lingvajn unuecon kaj evoluigon kaj firmbaze disvolvi komunan Esperantan kulturon. S-ro Juan Régulo Perez, estro de la kuraĝa, mondfama eldonejo STAFETO, tute pravis dirante ke "pli ol ĉio, nia literaturo garantias la lingvon kontraŭ pereo."

Kiel ni povus havigi al ni literaturon (notu ke ĉi tiu vorto ne egalas sed inkluzivas beletron) sen posedi la necesajn rimedojn aperigi eldonaĵojn? Ni ne vivas dum la Eŭropa Mezepoko kiam nur malmulte da homoj povis legi, kiam vagantaj bardoj konservis la popolajn tradiciajn literaturojn, kiam monaĥoj permane kopiis ĉiujn el la malmulte da havindaj libroj. La nuna epoko postulas de ni amasan eldonadon, vastan eldonadon. Tial, ĉe ni la aperigo de grandega kvanto da celtaŭgaj libroj ne estas lukso, kiel ŝajne opinias iuj Esperantistoj, sed neceso.

Mi ne estas blinda pri la fakto ke ĉe iuj Esperantistoj Esperanto estas nur flankafero, ŝatokupo. Koncerne ilin oni ne multe povas fari, sed seriozaj samideanoj devas multe pli atenti realece niajn problemojn kaj adopti efikajn rimedojn por solvi ilin. Kion ni, la membroj de JEN, faru? Ha! Jen la ora demando. Adresaro de la JEN-membraro helpegus. Pere de tio estus multe pli facile interkonatiĝi kaj komune agadi, se ne rekte en JEN mem, almenaŭ en starigotaj grupoj. Ekzistas multe da neesploritaj eblecoj. Se ĉi tiu artikolo interesis vin, bonvole skribu al mi. Mia nomo kaj adreso estas:

Michael Larkin
North Area, Bldg 406
Box 307
Fort Myer, Virginia 22211

Mi dankas.

## SINTENOJ PRI RELIGIO KAJ KONCEPTOJ PRI "DIO"

Gary Mickle

De iom da tempo mi emas surpaperigi kelkajn opiniojn pri la religio kaj la diversaj konceptoj pri "Dio," kio ajn tio estas, des pli post lego de la artikolo de Doug Montgomery ("Ĉu religio nun ion ajn signifas") aperinta en la 2-a numero.

Sendube ekzistas grandega nombro da eblaj sintenoj rilate la religion, kiujn elnombri mi nek intencas nek povus. Sed laŭ mia sperto oni povas ĝeneralige dividi la ĉi-sociajn homojn laŭ iliaj sintenoj en tri grupojn:

1) Nuntempe iom malofta, kvankam provizore revigliĝinta ĉe iuj gejunuloj (la "Jesuo-maniuloj"), estas la sinteno de serioza kaj fervora religieco, ofte karakterizita de prozelitismo kaj koncerno pri doktrinaj fajnaĵoj kaj dogmoj. Al tiu ĉi grupo certe apartenas s-ro Montgomery.

2) La plej ofta grupo tamen konsistas el homoj, kiuj sintenas, ke neniu sekto aŭ religio havas monopolon pri la vero. Ĉi tiaj kutime restas anoj de tiu sekto, kiun ili heredis de siaj gepatroj. Malgraŭ tio, ili pozitive kaj favore rigardas ne nur tiun sekton, sed la religion ĝenerale. Tipe ili eĉ diras, ekzemple, ke ĉiuj religioj estas nur malsamaj vojoj al unu sama Dio.

3) Finfine ekzistas la malmultaj senreligiuloj, kiuj sintenas aŭ indiferente aŭ malŝate kontraŭ la religio kaj ĉiuokaze malhavas ĉiajn supernaturajn, religiajn kredojn. Mi, ĉar ateisto, estas unu el tiuj.

Kredeble preskaŭ ĉiu troviĝas aŭ en unu aŭ ie inter du el tiuj tri grupoj. Por ĉi tiu diskuto mi rezignas doni nomojn al tiuj grupoj kaj devas kontentiĝi pri nenionesprimaj, sed ankaŭ nemiskompreniĝaj ciferoj. Estus eble nomi ilin respektive la grupoj "ekstreme religia," "modere religia" kaj "senreligia," sed tio implicas ian kontinuaĵon kun du ekstremoj (la 1-a kaj 3-a grupoj) kaj mezo (la 2-a). Mi preferas koncepti triangulon, ĉar fakte ĉiu el la tri grupoj troviĝas almenaŭ iumaniere ĉe ekstremo, dum aliflanke ekzistas similecoj inter ĉiu duopo, 1 kaj 2, 2 kaj 3, kaj ankaŭ 1 kaj 3.

Grupoj 1 kaj 2 evidente similas per tio, ke ili ambaŭ favore rilatas al la religio kaj posedas iujn religiajn kredojn, kontraŭe al grupo 3, kiu havas neniajn.

Grupoj 2 kaj 3 similas, ĉar kontraŭe al grupo 1, ili per sia konduto ne traktas la religion praktike grava. Ekzemple, partiano de la 2-a grupo, eĉ se laŭdire kristana, preferas ŝanĝi la temon de parolo ol provi "savi" min, se li ekscias min ateisto. Praktike, do, li traktas sian religion malmulte pli grava ol mi, kiu kompreneble ne gvidas mian vivon laŭ la doktrinoj de iu religio.

Laste, kaj plej signifoplene, grupoj 1 kaj 3 dividas komunan karakterizaĵon: tion, ke ili kritike rigardas la diversajn religiajn kredojn kaj decidas, ĉu ili jes aŭ ne ŝajnas kredindaj. Iu el la 1-a grupo tendencas nei tion, kion oni ne kredas en lia propra sekto. Iu el la 3-a tendencas nei ĉion supernaturan kaj sekve akceptas neniun religion. Tia verserĉado kontrastas kun la senkritika sinteno de iu el la 2-a grupo, kiu, laŭ la ekzemplo en la supra alineo, pli respektas la socian tabuon kontraŭ religiaj disputoj ol sian religion mem kaj emas kredi ĉiujn religiojn egale validaj.

Se oni komprenas, ke la anoj de tiu 2-a grupo superabundas ĉe ni, ĉar multoble pli multnombraj ol la anoj de la 1-a kaj 3-a kune, oni

facile komprenas, kial oni parolas pri "Dio sen diskuti aŭ disputi pri la efektiva naturo de tiu "fortego, la mondon reganta."[1]

Opiniosondoj ĉe la usonanoj montras, ke ĉirkaŭ 97% el ili "kredas je Dio." Kaj ne estas diferenca la nombro da kredemaj gejunuloj (96% laŭ unu sondo). Oni nur ne kutimas demandi, kia estas tiu "Dio." Ŝajnas al mi, ke la preskaŭ senescepta kredado je "Dio" kaj la lingva nedistingo inter diversaj dikonceptoj servas socian celon--krei iluzion pri unueca, interliganta baza kredo, kie tia fakte mankas.

Nedubeble estas, ke la plej ofta koncepto pri Dio estas tiu pri supera estaĵo, kiu havas ĉe ĉiuj tiakreduloj kelkajn komunajn trajtojn: ĉiopovo, ĉioscio, eterneco, alvokebleco per preĝoj, ktp. Sed eĉ tiun superan estaĵon oni imagas al si diverse. Konato mia, unu el la "Jesuo-maniuloj," diris, ke mi certe atingos inferon, se mi ne pentos kaj kristaniĝos. Jen kiel li avertis min pri kiel lia Dio punas pekulojn: "Ĉu vi povus ekbruligi alumeton kaj teni fingron en la flamo? Tio ja dolorus! Nun imagu al vi, kia estos infero, kie multe pli varmegaj flamoj brulos vian tutan korpon!" Laŭ li, kvankam Dio amas la homojn, li devas puni iujn el ili tiel pro "justeco." Sed eĉ multaj kristanoj neas tiun inferon nuntempe. Mi iam aŭdis kristanon diri, ke li ja estas kredanto, sed kompreneble ne kredas je infero "aŭ tia fatraso." La supera estaĵo do estas laŭ iuj amiko, laŭ aliaj timinda tirano (kvankam ankaŭ tiuj lin nomas amiko--eble ĉar li kompensas ilian lojalecon kaj servadon per utilaj servoj, ekzemple meti "fajrajn karbojn" sur la kapojn de iliaj malamikoj.[2])

Sed aliaj kredas je ia "Dio," kiu tamen ne estas supera estaĵo. Idealisma amikino mia iam diris sin ateistino, sed poste raportis al mi, ke nun ŝi kredas je Dio, ja ne tia, kia la kristana, sed je ia "spirito de boneco," kio ajn tio estas. Kiel povas okazi, ke ia "spirito de boneco" fariĝas dio, spite ke dioj origine estis nur superhomaj, pensipovaj estaĵoj, klariĝas nur, kiam oni komprenas la ege pozitivan emocian valoron de la vorto "Dio" kaj la sekvan maldeziron forĵeti ĝin el la propra vortaro. Ol tion fari oni preferas iel aliigi la sencon, per kiu oni uzas ĝin. La deziro uzi precizan lingvaĵon do akceptas duan rangon post la deziro iel partopreni la iluzie komunan kredon de la kunhomoj. La grandega plimulto da homoj, t.e. tiuj en la antaŭe priskribita dua grupo, senescepte kaj sen plua klarigo konfesas kredon je Dio, ĉar plaĉas al ili la fikcio, la iluzio, ke ili universale kredas je komuna fundamenta afero, kiun ili nomas Dio. Oni riproĉas cinikecon al la ateisto, kiu neas tiun fikcion. Kaj tute kompreneble. Antaŭ iu, kiu neas la ekziston de Dio, kredanto sentas sin devigata defendi la ekziston de tiu Dio. Por tion fari, li devas unue precizigi, ĝuste kio estas Dio. Kaj ili preferas eviti tiun demandon. Foje mi demandis al kristana pastro, kial li kredas je Dio. Li diris, ke li ne povas respondi, se <u>mi</u> ne provizus difinon pri Dio. Ne ĝenas min esti cinikulo pri tiu mistera, multforma Dio, "kiun ĉiuj malsame prezentas, sed egale en koro...sentas," laŭ la jam citita "Preĝo" de Zamenhof. Kaj mi fajfas ne malpli laŭte pri la klare konceptita, sed homece malvirta Dio de s-ro Montgomery.

---

[1] Zamenhof, L.L.: "Preĝo sub la Verda Standardo," bona ekzemplo pri la pensmaniero de la pli ekstremaj anoj de la 2-a grupo.

[2] Romanoj 12:20--Mi pruntas ĉi tion el la artikolo de s-ro Montgomery, kiu inkluzivis la kompletan citaĵon en sia artikolo.

## DEZIRAS KORESPONDI

Deziras interŝanĝe ricevi 33-1/3-diskojn kun modernaj jazz-kantoj kontraŭ diskoj de rusaj-ukrainaj popolkantoj, dancoj, ??-oj (la vorto aspektas kiel "estradrutinoj" aŭ io simila.) Ankaŭ freŝe emisiitajn pm-seriojn pri kosmo, bestoj, pentroarto kontraŭ la suvenira pup-skatolo "Zaporoĵja Kozako" (po 50 seriajn aŭ 100 diversaj neseriaj uzitaj-nestandartaj (??) ). Danielo Kolker, Zaporoĵje-33058, S-Kolcevaja 20-149, Sovetunio

* * * * *

## LETEROJ

"Kelkaj teologoj kredas ke la Mesio venis al la tero el la ĉielo en la formo de infaneto kaj tamen insistas ke Dio liveris Adamon plenkreska kunekzisti kun la animoj malaj, aŭ animaloj, kiuj havas similajn karnon, ostojn, organojn, sentojn, kaj bezonojn, ilia ĉefa malsimileco estanta ilia genetika konflikto. Konfliktaj genoj inter leonoj kaj ĉevaloj, kaj inter ŝarkoj kaj balenoj ne plu pruvas ke ili ne estas parencoj ol konfliktaj sangogrupoj inter kelkaj homoj kaj aliaj pruvas ke homoj ne estas parencoj. Homoj ne nature interŝanĝas sangon, kaj specoj ne nature interŝanĝas genojn.

"Se la valoj estas lagoj el rompita roko, ĉu tio signifas ke Dio rompis la rokon kun sia granda martelo? Kie finas la kreo kaj komencas la sekvado? Ĉu ni tranĉas la eternon el la sekvado--simile kiel prepucioj kaj viando? Kial oni insistas ke Dio estas magiisto-reĝo kaj laboro estas puno por pekuloj, sklavoj, kaj nekleruloj? Kial oni insistas ke skalaj kontrol-formuloj estas pligravaj ol vektoraj labor-formuloj faritaj kun angulmezuriloj anstataŭ kun skaloj? Kial oni insistas ke Jesuo diris, "Mi estas la Vojo, la Vero, kaj la Lum-Ŝaltilo," tiamaniere dividanta la kosman universon en du klarajn ekstremojn? Kreo aŭ evolucio, la fina produktaĵo estas la sama. La evolucio estas nur malrapida miraklo."

James Parkerson

## "SOPIRO"

Etendas sin roza somero
kun suna lumoro plenplena.
Ĉu venos la tag' de la vero
de l'muta sopiro ebena?

Ne estos mezuro, odoro
ne estos hazarda stacio
nek ĉarm' de l'akacia floro
se trajn-memoro strebas ie.

Kredante ke venos tiu tago
kaj mi ja naskiĝos dufoje
en kiu mi vidos la lagon
stratetojn kun mar-vent' laŭvoje!

Mi scias ke nun ie sole
sonoras sirenoj--vekiĝas
bulvardoj ĉe Odra*--simbole
laŭ mia kor' tio estiĝas

De ĉiu tag' pola vi vere
komprenus eĉ tuj la belecon
se portas sopiron sincere
plej grava anima riĉeco..

Lila Wysinska

*ODRA - nomo de unu granda rivero en Pollando

"Mi multe ĝuis tiun konferenc-raporton de Erik en la lasta numero, precipe pro la best-listo.

"Mi ŝatus klarigi por la legantoj, do, la diferencon inter krokodilo kaj aligatoro. Dum longa tempo mi cerbumis pri tiu punkto, sed finfine JEN-ano Walter Murawski, dum li loĝis en Toronto, klarigis la aferon por mi. Mi bedaŭras, ke la klarigo iomete forpuŝas la difinon de "vombato".

"Oni krokodilas kiam en Esperantio oni uzas la denaskan nacian lingvon inter samlingvanoj. Ekz., anglo renkontas anglon kaj ili parolas angle.

"Oni aligatoras kiam en Esperantio oni uzas alian komunan lingvon inter nesamlingvanoj. Ekz., polo renkontas ĉeĥon kaj ili parolas ruse.

J. Brian McClafferty

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

U. E. A. -- KERNO DE NIA MOVADO

Novaj lernantoj de Esperanto ofte surpriziĝas ĉar ili trovas, ke malantaŭ la lingvo kuŝas tuta kulturo, tuta vivmaniero. Estas eldonataj libroj en Esperanto; okazas kongresoj; oni instruas Esperanton en lernejoj; ekzistas tiel nomata delegita reto; la esperantistoj mem sin organizas en landaj kaj fakaj asocioj.

Eksciinte kaj ekspertinte tiujn aktivecojn, ni kompreneble mencias ilin por pruvi al niaj konatoj, ke Esperanto ja vivas kaj floras. Tutcerte ni montras al la Universalaj Kongresoj, kiuj kunigas dumilon da homoj ĉiujare; ni verŝajne ankaŭ parolas pri la Jarlibro, kie estas listigita amaso da organizoj kaj homoj kiuj estas je la servo de la esperantistoj; eble ni ankaŭ mencias la revuon Esperanto, impona primovada gazeto. Estante gejunuloj, ni eble aludas al la Esperanto-junularo, kaj ties revuo, kongresoj, kaj aliaj servoj.

Eble ni ne mencias unu fakton tamen tre fundamentan: la motoro kiu liveras impulson por ĉiuj tiuj aktivecoj estas UEA. Universala Esperanto-Asocio organizas la Universalan Kongreson, eldonas la jarlibron, informas nin pri la movado per sia revuo. Se ni bezonas la servojn de delegito, ni turnas nin al UEA; se ni bezonas libron, ni turnas nin al la recenzoj en revuo Esperanto kaj al la libroservo de UEA; se ni deziras eksterlandan korespondanton, ni skribas al la Koresponda Servo de UEA, se ni volas sonbendon pri iu prelego aŭ alia okazintaĵo en la Esperanto-movado, ni direktas nin al la Magnetofona Servo de UEA. La landajn kaj fakajn asociojn kunordigas UEA; kontaktojn kun la neesperantista gazetaro prizorgas UEA; UEA agas kiel nia reprezentanto antaŭ la ekstera publiko. Kaj, se ni havas plendojn ni kutime sendas ilin al UEA!

Oni povas, kun pravo, aserti, ke se ne ekzistus Universala Esperanto-Asocio, ne ekzistus Esperanto-movado. Certe la junulara Esperanto-movado ne povus ekzisti, ĉar tiun movadon organizas ĝuste la junulara sekcio de...UEA.

Kiel junulo, vi povas aliĝi al UEA je rabatitaj prezoj. Persono en la kategorio Juna Membro-Abonanto devas havi malpli ol 22 jaroj; persono en la kategorio Membro-Abonanto kun Kontakto devas esti 22 ĝis 26-jara. Ambaŭ kategorioj ricevas la monatan organon de UEA (la bela kaj interesa revuo Esperanto), la Jarlibron (vere esenca kompendi de informoj por la aktiva esperantisto), kaj la kvaronjaran junularan revuon, nian revuon, Kontakto. La kotizoj estas 22,50 nederlandaj guldenoj /$6,25/ jare por JMA, kaj 30,00 ned. guld. /$8,40/ jare por MAK.

ĉi tiun artikolon disponigis Humphrey Tonkin.

Aliĝojn, kotizpagojn [redacted] en Usono prizorgas nia Ĉefdelegito: S-ro Armin Doneis, [redacted]5, Pharr, Texas 78577.

HANOVER N.H. JUL 30 PM 1971 03755



## Vortludo

La celo de tiuj ĉi ludoj estas eltrovi la vorton kies indiko estas ĉe la komenco de la ludo. Tion vi faras per trovi la aliajn, pli simple troveblajn vortojn, kaj poste aranĝi la literojn en kvarangulojn por formi la finan respondon. Bonŝancon.

k r a v a t o -- indiko: Viro en sia oficejo portas ________n.
l a [k] [t] o = oni faras fromaĝon el tio ĉi.
[a] [v] i n o = la patrino de via patro.
g [r] u [p] o = aro da bestoj.
b l [a] n k [o] = malo de nigro.

v o j a ĝ o -- indiko: Se vi havas amikon eksterlandan, ĉu vi ne volus fari __________n?
g r a [v] [a] = malo de bagatela.
p l a [ĝ] o = kie oni banas sin en la maro.
k u i r e [j] o = kie oni preparas manĝaĵon.
k [o] _ _ _ _ [o] = miksaĵo de fruktoj, ĝenerale kuiritaj.

a d r e s o -- indiko: Ĝi estas necesa por sendi leteron.
j e [s] = malo de "ne".
ŝ [a] f i [d] o = juna ŝafo.
s t [r] a t [o] = oni promenas aŭ veturas laŭ la ______________.
ĉ [e] f = plej grava, ekz. la ____-urbo de la lando.

de Erik Felker

GRAVA AVIZO: Kontribuojn al la JEN-Bulteno ek de nun sendu al Erik Felker, 731 Birmingham Road, Burbank, CA 91504.

Redakcio, JEN-Bulteno
Gary Mickle
1519 Lemon Lane
Davis, CA 95616
U. S. A.

DAVIS JUL 27 PM 1971
UNITED STATES 8c

FIRST CLASS

[redacted]

ADDRESS CORRECTION REQUESTED

[redacted]